



Estrara Komunikado EKO 2017-34 sendita el Budapeŝto, la 16an de decembro.

Al: Landaj kaj Fakaj Asocioj de UEA (aliĝintaj kaj ne). Plie al la Komitato, Konsilianoj, regionaj komisionoj de UEA, ILEI-aktivuloj, TEJO-estraro, gazetaro, partoprenintoj en iuj AMO-seminarioj, aliaj listoj kaj unuopuloj.

Por tuja uzo kaj plia diskonigo inkluzive de la alkroĉaĵoj kun indiko de fonto: EKO de UEA

AMO unuafoje pri niaj eksteraj rilatoj

La specifa temo estis: *AMO-seminario pri Unesko*, ĉar en la urbo de lumo troviĝas la sidejo de Unesko kaj koncentriĝas tie la rilata agado de UEA kaj ILEI kaj TEJO. Tiu 41a AMO-seminario okazis dimanĉon, la 10an de decembro 2017 en la sidejo de Esperanto-France meze de Parizo, ligita kun la festado en la sidejo de Unesko pro la fino de la Zamenhofa jaro, pri kio ni raportos aparte.

La seminario entenis kvar prezentaĵojn, ĉiuj de spertuloj pri la temaro:

La funkciado de Unesko estis la temo de Saŝa Kovyazina. Ŝi klarigis pri la historio kaj strukturo, sektoroj, membroŝtatoj kaj Ne-Registaraj Organizoj (NROj) de Unesko kaj Unuiĝintaj Nacioj, iliaj oficejoj kaj instancoj: kiu decidas kion? Al kiu sin turni pri difinita demando? Ŝi plie traktis la lingvan demandon en Unesko.

Esperanto kaj Unesko estis la temo de Mireille Grosjean. Ŝi skizis la historion pri la eko de la konsultaj rilatoj de UEA kaj ILEI, la du resolucioj, la 90-aj jaroj kaj nuna stato. Ŝi tuŝis temojn pri la Jaro de la Lingvoj kaj la jaro de Zamenhof kaj pluraj organizoj (UEA, ILEI, TEJO) kaj iliaj roloj kun demando: kion faru Esperanto-delegito en Unesko?



La Unesko-Kuriero kaj ĝia retejo estis la temo de Trezoro Huang Yinbao. Li rakontis pri la antaŭa Unesko-Kuriero kaj la financa problemo kaŭzita pro la retiriĝo de Usono el kunlaboro (kaj financado), la nuna reapero de la presita formo de la Unesko-Kuriero dank'al Ĉinio, la Unesko-Kuriero en Esperanto: la nuna situacio kaj planoj, kaj kiel enkonduki Esperanton en Uneskon kaj en ĝian retejon.

En la foto: Trezoro kun la ĉefredaktorino de la Kuriero, s-ino Jasmina Ŝipova. Foto: SMG

Nemateria mondheredaĵo de Unesko estis la temo de Barbara Despiney, kiu skizis la kriteriojn kaj procedurojn por kandidatigi sin por nemateria mondheredaĵo, kion Esperanto sukcesis en Pollando. Ŝi starigis la demandon ĉu Esperanto havas ŝancon kaj per kiuj argumentoj? La intertempe alveninta vic-prezidanto de UEA, Stefan MacGill, informis pri la rezultoj de siaj tiutemaj esploroj, kiujn li antaŭ du jaroj faris.

Komence de la seminario la dudeko da partoprenintoj ricevis dupaĝan pritaksilon. La unuan parton ili plenumis komence, la duan parton fine. El inter la prijuĝoj: "Estis plezuro konstati la efiko-celan etoson ekzemple dum la fina kunsido de AMO 41", "Bonis ekscii pri la naskiĝo de la Kuriero en Esperanto, ankaŭ pri la historio de rilatoj inter UEA kaj Unesko." "Ĉar la laboro farinda estas granda, necesas pli bone kunordigi niajn homajn rimedojn".

Raportis: SMG

Semajnon pli frue, la 40a AMO en Moskvo

La 3-an de decembro okazis la 11-a Moskva Esperanto-renkontiĝo, kadre de kiu okazis ankaŭ la unua en Rusio kaj jubilea 40-a AMO-Seminario kun la temo "Publikaj rilatoj kaj Esperanto: tradiciaj amaskomunikiloj, interreto". Partoprenis 23 esperantistoj el 3 landoj. Kadre de la aranĝo okazis pluraj interesaj prelegoj, prezentadoj kaj komuna kantado de Esperanto-kantoj. Tradicie, la preskaŭ seninterrompa Esperanto-programo daŭris preskaŭ 9 horojn kaj finiĝis nur malfruvespere. La aranĝon partoprenis ankaŭ konataj en Esperantujo bardoj Mikaelo Bronŝtejn kaj Sergeo Straŝnenko, kiuj prezentis riĉan kantan kaj poezian programon.

Detalajn informoj pri tio, kio estas AMO vidu ĉe <http://aktivulo.net>.

Raportis Dima Ŝevĉenko

Vortoj: 505

=====

Ĉi tiu komunikado estas disponebla laŭ la permesilo Krea Komunaĵo Atribuite Samkondiĉe 4.0 Tutmonde. Por pli da informoj vidu ĉe: <https://creativecommons.org/licenses/by-sa/4.0/>.

Aperintaj komunikoj legeblaj ĉe: <http://aktivulo.net/eo/content/komunikoj-pri-agado>

ALDONU VIN: Skribu al <stefan.macgill<ĉe>gmail.com>. Neniu alira kondiĉo aldone al valida retadreso. Malferma al Aligitaj Membroj, eksmembroj, neniam-membroj, volapukistoj ktp.

SUBTRAHU VIN: Skribu al la supra adreso. Donu vian nomon, retadreson, landon kaj (se eble) la grupon aŭ kialon por via ĉeesto en la ekspedolistoj.